

Literatura Mondo, 13-a parto :
La liberiga rolo de la Plena Gramatiko kaj de la Plena Vortaro
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 639, 1976.01.07 & 10

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La apero de la Plena Vortaro de SAT kaj de la Plena Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien en 1931 kaj 1935 alportis ege profundan revolucion en la psikologia sinteno de la esperantistaro.

A.- Ĝis la jaroj tridekaj la komuna lingva normo estis la netuŝebla Fundamento de Esperanto. Antaŭ tiu ĉi monumento, kiu simbolis la lingvon mem kaj ties aŭtoron, ĉiu devis sin konduki respektive. Eksteraj observantoj ofte parolis pri la praktikantoj de la zamenhofa idiomo, kvazaŭ pri adeptoj de nova religio, kies ĉefa relikvo estis tiu sankta libro Fundamento.

Cl.- Ili ne povis kompreni la sintenon de la esperantistoj, ĉar ili ne travivis ĝin. La esperantistoj psikologie rilatis al la Fundamento, kiel gefiloj rilatas al patra heredaĵo. Sed tiu vivetapo ne povis eterniĝi. La gefiloj fariĝis plenkreskaj.

A.- Subite, en sinsekvo de kelkaj jaroj, aperas du verkoj, kiuj sin proklamas plenaj : la Plena Vortaro de Esperanto kaj la Plena Gramatiko de Esperanto. Spontane la tuta esperantistaro ilin akceptas kiel novan lingvan normon.

Cl.- Sed rilate al tiu ĉi normo la esperantistoj montriĝas plenkreskuloj : ili konservas sian kritikemon.

A.- Ni tre esperas, ke foje psikologo priskribos la liberigan rolon de la Plena Vortaro kaj de la Plena Gramatiko. En kelkaj jaroj la Fundamento perdis sian antaŭan signifon de sankta libro por fariĝi epokfara ĵalono, historia dokumento aŭ zamenhofa frazaro. Oni daŭre sentis la bezonon respekti tiun ĉi fundamenton, sed ne plu kiel adorantoj. Oni komencis rilati al ĝi kiel observantoj kaj studentoj, observantoj kaj studentoj pli kaj pli memstaraj.

Cl.- Dum pri la Fundamento ĉiuj konservis unuaniman respekton, pri la Plena Vortaro kaj la Plena Gramatiko ĉiuj sentis la bezonon konservi plenan liberecon. La verkistoj, la gramatikistoj, la redaktistoj ekde nun difinas sian pozicion. Ili libere kritikas la difinojn de la Plena Vortaro kaj la regulojn de la Plena Gramatiko. Tiujn ĉi kritikojn eĉ alvokis iliaj aŭtoroj. En 1936 malfermiĝas detala ekzameno de la Plena Gramatiko kun tiu ĉi enkonduko :

A.- « La aŭtoroj de la Plena Gramatiko, s-roj Kalocsay kaj Waringhien, proponis al la Akademio, ke la Akademianoj kaj lingvokomitatoj esploru la verkon kaj faru pri ĝi siajn rimarkojn. S-ro Rollet de l'Isle, la Prezidanto de la Akademio, afable akceptis ĉi tiun proponon kaj en cirkulero alvokis la membrojn de niaj lingvaj institucioj, ke ili partoprenu en ĉi tiu enketo. Laŭ interkonsento, la kritikaj artikoloj estos publikigitaj en Lingvo Libro. [...] En la nuna numero ni komencas la publikigon de tiuj kritikoj. [...] Ni esperas, ke la diskuto, kiu [...] disvolviĝos sur niaj paĝoj, estos utila kaj fruktodona. »

Cl.- Atenta tralego de tiuj ĉi kritikoj kaj de la respondoj de Kalocsay montras, ke tiu ĉi lingva diskuto estis bonvena, sed ke multaj homoj ne estis pretaj travivi ĝin, inkluzive de Kalocsay mem. La kritikantoj tro ofte ne kapablis kompreni la argumentadon de Kalocsay kaj Waringhien, kaj tiuj ĉi aŭtoroj pli kaj pli laciĝis debati kun neegaluloj. Tre bedaŭrinde la dua

mondmilito abrupte interrompis tiujn ĉi lingvajn diskutojn. Post la konflikto la Nica Revuo provis ilin reveki. Bedaŭrinde tiu ĉi organo grupigis nur samtendenculojn.

A.- Ni havas la impreson, ke nur nun renaskiĝas tiu ĉi diskuto lingva. Estas interese konstati, ke ĝi prenas neatenditan direkton : la novaj esperanto-lingvistoj ekdubas pri la pravenco de la vortfarada analizo de Kalocsay kaj Waringhien, kies fundamento estas la teorioj de René de Saussure. La estonteco diros, ĉu nova kaj same universale akceptita verko venos foje anstataŭ la Plenan Gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien.

Cl.- Ferenc Szilagyi, en 1936, por enkonduki la diskuton pri la Plena Gramatiko, verkis artikolon, kiu konservas sian aktualecon. Li titolis ĝin : Ellerni ! Kun Kabe kaj Hodler, li provis komprenigi al la esperantistoj, ke antaŭ ol la aliaj lernos esperanton, almenaŭ la esperantistoj tion faru. Ni citu kelkajn frazojn el tiu ĉi artikolo de Szilagyi :

A.- « [...] Kabe estis tiu, kiu foje sur la ferdeko de iu kongresa ŝipo, kiu optimisme velis sub la optimisma ĉielo de la unuaj kongresjaroj, diris ion tre pripensindan, ion tre konsiderindan. Sur la ŝipo ĉiu ŝvebis en la serena ĝojo ; oni antaŭvidis la plej rapidan venkon ; oni parolis pri la kuracistoj, inĝenieroj, komercistoj, kiuj baldaŭ lernos Esperanton, ĉar nature la tuta mondo devas baldaŭ lerni nian lingvon. [...] Jes, ĉiuj devas lerni Esperanton, oni konkludis kaj ĉiu ĝojis, homoj, lago, ĉielo, birdoj kaj suno. La harmonia volo ŝajnis kunligi ĉiun kaj ĉion : Ĉiu devas lerni Esperanton ! – Kaj tiam ekparolis la sola pensema ombro de tiu ĉi sunplena tago. Kabe estis, li diris : « Unue la Esperantistoj devas lerni Esperanton ! »

Cl.- Szilagyi aldonis : « Oni ne povas forgesi tiujn vortojn kaj oni ne rajtas nei, ke Kabe pravis. »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!